Martin Gotthard Schneider,

# Sieben Leben möcht ich haben

Sieben Leben möcht ich haben!
Ach, das wäre wunderbar,
denn da würden alle Träume,
alle meine Wünsche wahr.
In dem ersten Leben wär ich
Steuermann und Kapitän
und ich könnte mir die weite,
zauberhafte Welt besehn.

Träte auf im nächsten Leben
dann im Zirkus, bitte sehr,
und man würde mich bestaunen,
mal als Clown, mal als Dompteur.
Und im dritten Leben käm ich
als Politiker heraus,
konferierte täglich zwischen
Moskau und dem Weißen Haus.

Filmstar und auch Schlagersänger,
dieses reservier ich mir
(schnelle Autos, schöne Frauen)
für das Leben Nummer vier.
Um der Menschheit aufzuhelfen,
wär im fünften Leben ich
ein gar hochberühmter Arzt und
Wunderdoktor sicherlich.

...

Martin Gotthard Schneider,

# Vivojn sep mi volus havi

*tradukita de Adolf Burkhardt*

Vivojn sep mi volus havi.
Kia beno, kia riĉ'!
Tio por deziroj ĉiuj
estus rava plenumiĝ'.
La unuan mi eluzus,
ŝxip-stiristo, kapitan',
por la vastan mondon vidi,
veli sur la ocean'.

En la dua vivo min en
cirko kovrus klaŭna vest',
kaj admirus ĉiuj min, dre-
siston de sovaĝa best'.
En la tria, politike
estus mi tre grava hom',
ĉiutage inter Moskvo
flugus kaj la Blanka Dom'.

Film-stelulo, kanzonisto
estus mi en vivo kvar;
ŝikajn aŭtojn, belajn inojn
mi posedus sen avar'.
Kaj por helpi la homaron,
en la kvina vivo mi
estus kuracisto fama
en tre alta pozici'.

...

Sechstes Leben: Das Bisher'ge
scheint mir alles zu gering.
Weltraumfahrer möcht ich werden.
Das wär schon ein tolles Ding.
Und im siebten Leben wär ich -
ja, was könnt ich da noch sein?
Ganz gewiß fällt mir bis dahin
irgendwas Besondres ein.

Sieben Leben möcht ich haben!
Eines ist mir zugeteilt.
Und nur eines kann ich leben,
ehe es im Nu enteilt.
Daß dies eine, meines, hier mit
Freude, Kummer, Pflicht und Spaß
doch ein gutes Leben würde:
Hoffentlich gelingt mir das.

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas* Martin Gotthard Schneider *(∗1930-04-26).*

*Arg-962-1938 (2014-03-16 15:47:47)*

*Pri la poeto vidu la retejon* http://de.wikipedia.org/wiki/Martin_Gotthard_Schneider. *Vidu ankaŭ:*http://www.hsk-freiburg.de/mgschneider.html. *La poemo kun la esperantigo troviĝas anakaŭ en* http://b-eichkorn.homepage.t-online.de/oekesa34.htm#SiebenLebenmΓychtichhaben.

Sesa vivo: ĉio nuna
estis nura bagatel'.
Kosmonaŭto mi fariĝos,
flugos inter lun' kaj stel'.
En la sepa vivo - nu, mi
kio povus esti plu?
Certe venos la ideo,
speciala, sen tabu'.

Vivojn sep mi volus havi.
Mi ricevis unu por
sole tiun ĉi travivi,
antaŭ ol ĝi flugis for.
Tiu unu, mia, nun, kun
ĝojo, trist', plezuro, dev' -
ke ĝi estu bona vivo -
jen sincera mia rev'.

*Traduko de la Germana poemo "Sieben Leben möcht ich haben" de* Martin Gotthard Schneider *(∗1930-04-26) en Esperanton de* Adolf Burkhardt *(pastro, ∗1929-04-10 – †2004-04-02).*

*Arg-962-1939 (2014-01-10 18:35:57)*

*Pri la tradukinto vidu la retejon* http://de.wikipedia.org/wiki/Adolf_Burkhardt.